

ÖSTERREICHISCHE  
NATIONALBIBLIOTHEK

708.924-C

ESP





# LA GERMANA TURISTO

---

PAROLADO

DE

Sinjoro Pastro WETTERLÉ

ĈE LA ĜENERALA KUNVENO

de la Franca TOURING-CLUB (5 dec. 1915)



PARIS

LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO ET DES ALLIÉS

51, RUE DE CLICHY, 51

1917

Eldonoj de la Komitato POR FRANCUJO, PER ESPERANTO

~~Numero 1-2~~

708.924 - <sup>C</sup>β Esp -

Fako: S

WETTERLÉ, [Emile]

Sk. 10 Vol.

G. N. M.

Duoblaĵoj

UNIVERSALA ESPERANTO BIBLIOTEKO

UNIVERSALA ESPERANTO BIBLIOTEKO

UNIVERSALA ESPERANTO BIBLIOTEKO

UNIVERSALA ESPERANTO BIBLIOTEKO

UNIVERSALA ESPERANTO BIBLIOTEKO



UNIVERSALA ESPERANTO BIBLIOTEKO

UNIVERSALA ESPERANTO BIBLIOTEKO

UNIVERSALA ESPERANTO BIBLIOTEKO

UNIVERSALA ESPERANTO BIBLIOTEKO

UNIVERSALA ESPERANTO BIBLIOTEKO

UNIVERSALA ESPERANTIA BIBLIOTEKO		
R	4273	1925

E  
Esp

# LA GERMANA TURISTO

Parolado de Sinjoro Pastro WETTERLÉ,

ĉe la ĝenerala kunveno de la Franca TOURING-CLUB

(5 dec. 1915)

Sinjoro PREZIDANTO de la RESPUBLIKO, Gesinjoroj,

La Germanoj gloras sin, ke ili posedas la organizan genion. Nenio estas pli vera. En tio kuŝas ilia forto, sed ankaŭ la signo de ilia malforta flanko. Efektive, se oni konsideras ilin individue, ili estas tute seniniciatemaj. Estante laŭ sia naturo esence senpensaj imitemuloj, ili bezonas estrojn, kiuj engrupigas kaj direktas ilin kaj kunordigas iliajn penadojn. Ne petu vi, ke ili malfermu novajn vojojn por la homa agado, ne petu, ke ili persone montriĝu trovemaj kaj elpensemaj. La eltrovojn, kiuj honoras la homaron, faras la aliaj. La Germanoj kontentiĝas ekspluatante ilin metode kaj prenante el ili sufiĉegajn profitojn. Oni permesu al mi okaze de tio rimarkigi, ke eĉ pri tiu arto de la milito, en kiu la Germanoj estas eminentaj, farinte ĝin sia ĉefa nacia industrio, ili povis nenion eltrovi. La rapidpafa kanono, la senfuma pulvo, la aeroplanoj, la submaraj ŝipoj, ĉio tio estas francaj elpensadoj, kiujn la imperianoj sklave kopiis, almetante tamen ĉe ties utiligado tiun obstinecon kaj persistemon, per kiu ili tiris el ili la plej eble grandan efikon. Kaj sur ĉiuj kampoj estas la samo: teoria scienco kaj praktika scienco ŝuldas al ili nur sensignifajn progresetojn. Tamen tuj kiam gravaj progresoj estas efektivigitaj alilande, la Germanoj scias, dank'al sia mirinda disciplino, tutkapti ilin kaj organizi kun detalema zorgo ilian ekspluatadon. Tiuj homoj estas kerne aneksemaj. Ili ne kontentiĝas ŝtelante provincojn, sed ili ankaŭ rabas la ideojn kaj, ŝanĝante kun ega senhonteco ilian nomon, deklaras ilin germanaj, nur pro tio, ke la Germanoj sciis tiri el ili pli multajn materialajn profitojn ol la elpensintoj. Cetere ĉu ili ne estis tiel multimemaj, ke ili pretendis depostuli kiel kunrasanojn la plej grandajn geniulojn en la pasintaj tempoj, Rafaelon kaj Mikaelanĝelon, Johaninon d'Arc kaj Napoleonon.

Ni permesu, ke iliaj historiistoj fordonu sin al tiaj ridindegaj fantaziaĵoj. Ni nur konstatu, ke individualismo ne ekzistas en nuntempa Germanujo, kie Prusujo, bezonanta kaj sklavanima, sciis altrudi sian krudan spiriton al la germanmiksitaĵo Keltoj el la sudaj kaj apudrejnaj regnoj.

Nu, bazita sur tiu ĉi apartaĵo de la nacia karaktero reve konstruiĝas la tuta ŝajna grandeco de Germanujo. Lakeema popolo (ne mi, sed la Rejnvestfala Gazeto, la plej granda pangermanista ĵurnalo, nomas ilin tiamaniere: DIENERNATUREN.), lakeema popolo obeas blinde al siaj estroj. La germano ne povas labori se li ne estas firme ĉirkaŭgvidata de ordonantoj. Eĉ en siaj amuzoj li almetas la saman metodemon. La studentoj eltrinkas siajn bierglasojn nur laŭ ordono. En la popolaj bierejoj estas por ĉiu tablo prezidanto, kiu reguligas la ceremoniaron de la drinkado. Ĉio estas militiste regata kaj obeemigita en tiu lando, kie la oficiro, reprezentanto de la supera klaso, estas ne nur respektata defendanto de la civilizacio, sed ankaŭ ĝia fina rezultato.



Kaj ĉar tiel severa organizo antaŭnecesigas potencon hierarĥion, Germanujo fariĝis tradicie la kastolando, kie ĉiu regnanto aŭ, por pli ĝuste diri, ĉiu subulo ambicias nur leviĝi ĝis la superaj societaj ŝtupoj por povi kapti parteton el la aŭtoritato, superpotenci la aliajn kaj sin venĝi, per aroganteo kaj malmodesteco, pro la malfierigoj, kiujn li iam devis suferi. Oni neniam povos scii, kiajn penadojn kaj ankaŭ kiajn malnoblaĵojn kapablas Germano por akiri publikan oficon, titolon, ordenon aŭ simple arogantan favoraĵon de siaj superuloj. La kontraŭaĵo cetere ekzistas, ĉar tuj, kiam li sukcesis plialtiĝi je unu ŝtupo super siaj samregnanoj, la elsaltulo opinias, ke li ne povas sufiĉe malŝati tiujn, kies humilan situacion li ankoraŭ antaŭtage partoprenis.

La prusa junkro, tiu korpogardisto de la Hohenzollern'oj, mirinde profitis tiun emon de la germana popolo al sklaveco. Armeo tute maŝinigitaj, kie nepenetreblaj muroj severe stariĝas inter la oficiro, el supera raso, kaj la soldato, simpla aŭtomato, kie la redungiĝintaj suboficiroj daŭrigas tradiciojn de neforigebla bruteco; universitatoj, kiuj estas komisiitaj por fleksi la junajn spiritojn sub plej perforta spirita disciplino; gimnazioj kaj popolaj lernejoj, kie la patriotisma instruado estas la ĉefa inter ĉiuj aliaj; veteransocietoj, kiuj konservas la militistan emon en la amaso; naciaj sindikatoj, trustoj, kiuj ebligas al la industrio kaj al la komerco dekobligon de ilia agado; kaj super ĉio la potencaj ŝovinismaj societoj, kiuj preparas, per sia laŭsistema agado, la grandajn opiniomovojn kaj kunigas en harmonian tutaron ĉiujn naciajn energiojn: tia estas la verko de la direktantoj de la prusa politiko. Tenata en tiu timeginda meĥanismo, la Germano, kiun lia temperamento antaŭinklinigas al ĉiuj cedoj, ne ekzistas plu individue; li fariĝas tute nature humila rado en la granda ŝtata maŝino, kaj li turniĝas, turniĝas nekontraŭstarante, puŝate de la unusola kaj nekontraŭstarebla movanto.

Tamen, ĉar en ĉiu homo ĉiam restas instinkta bezono je sendependeco kaj mastreco, la germanaj intelektuloj trovis mirindan formulon por kontentigi ĝin ĉe siaj plej malaltaj samnacionoj. Tiel estiĝis la frenezula teorio pri la antaŭdestinita raso, pri la superega popolo, pri la nacio de la mondestroj, pri tiu blondhara kaj bluokula Germano, kiun la maljuna dio komisiis por sklavigi la malsuperajn rasojn kaj eltiri ilin pli efike el barbareco kaj degenerado.

Oni ofte primokis la pangermanistojn, kaj efektive al tiuj, kiuj ne konas Germanujon per longtempa restado, ŝajnis, ke la frenezeca doktrino de tiuj furiozeguloj povas varbi adeptojn nur en tre malvastaj rondoj. Nu tiu doktrino estis malrapide penetranta en la popolajn masojn. Unue diskonigita en la universitatoj, kie ĉiuj sciencoj estis speciale germaniĝintaj, ĝi baldaŭ fariĝis akso por la tuta oficiala instruado kaj disvastiĝis eĉ en la financistajn kaj industriistajn rondojn, same kiel en la popolajn. Estas tiel agrable aŭdi ĉiutage ripeti al si, ke oni apartenas al elektita raso kaj ke al tiu raso nepre estos iam donata la universa superregado. Ankaŭ pri tio la pasiveco de la germana spirito, kiu facile akceptas antaŭpretajn formulojn, ne penante por ekzameni ilin pli akurate, devis meti antaŭ ni veran kolektivon frenezon, cetere intencitan, pacience inokulitan al popolo da sensprita sed ĉiam malsataj dente-skrapantaj bestoj.

Jen la rezultato de tiu lerta ekzercado: antaŭ cent jaroj Germanujo estis nur polveraro da regnoj, nepre senpotencigita de nenoblaj rasaj vetbataloj. Malriĉa sed profitavida Prusujo sciis per perforto kaj perfido kunlui tiujn senformajn erojn en imperion, kie ĝi superregas. Ĝi altrudis al la hieraŭaj venkitoj, fariĝintaj ĝiaj cedemaj sklavoj, sian rigidan disciplinon, sian supermezuran malhumilecon, siajn senkompatajn avidojn. En la nuna horo, la Bavaro kaj la Sakso, edukitaj de la prusa instruado, apenaŭ diferencas je la Brandenburgano kaj je la Pomerniano. Ĉie regas sama obeemo kaj ankaŭ ĉie la metoda dresado estiĝis la samajn rezultatojn. La

Germano plene formetis sian individualismon, li povas esti nur la facile forĝebla ero de la granda ŝtata organismo al kiu li apartenas kaj kies opa prospereco certigos lian propran bonstaton. Antaŭ ol zorgi pri sia privata utilo, li penas por pliigi la nacian riĉecon. Por li, la scienco kaj la virto, la civilizacio kaj la progreso estas precipe germanaj. Ekster la germanismo estas nenia saviĝo, kaj al la patrujo, kiu, laŭ lia opinio, resumas ĉiujn perfektecojn, li estas preta, ne pro senrezona entuziasmo, kiun li ne kapablas, sed pro tiu spiritdirekto al profitema solidareco, kiun oni sisteme enigis en li, oferi ĉiujn siajn fortojn, ĉiujn siajn energiojn, eĉ ĉiujn siajn tradiciojn kaj antaŭjuĝojn.

Tiu ĝenerala skizo pri la germana pensmaniero estis, malgraŭ sia longeco, necesa por konduki nin al la temo, kiun mi volas pritrakti hodiaŭ antaŭ tiu ĉi multnombra kaj brila aŭdantaro. Vi permesos ankoraŭ, Gesinjoroj, ke mi faru pluan temodekliniĝon, nur ŝajne senutilan, antaŭ ol mi prezentos al vi la germanan turiston.

Ĉar ili scias, ke iliaj samnacionoj, se ili estas forlasataj al sia propra direkto, ne estas kapablaj kontraŭstari al la estriĝo de la rondo en kiu ili manovras solaj kaj sengvidaj, tial la pangermanistoj, konsentite kun la imperia regantaro, asignis al si jam de kelkaj jaroj la taskon grupigi ĉie, kie ili estas sufiĉe multaj, la Germanojn, kiuj forlasis la ĉefpatrolandon.

Dum longa tempo Germanujo estis tro malriĉa por nutri sian tre naskeman loĝantaron. Centmilope da la regatoj de la germanaj landestroj estis elmigrintaj en la multesperigajn landojn. Ekzistis multthomaj germanaj kolonioj en Usono, Brazilujo, Ĉilio, Kaplando, kaj malpli fortaj grupoj en Francujo, Italujo, Hispanujo, Skandinaviaj Landoj, Turkujo kaj Balkanlando. Ĉirkaŭ dudek milionoj da Germanoj estis tiamaniere definitive hejmfarintaj en fremdlando antaŭ ol la nacia prospero finis la elmigradon.

Ĉu tio estis akceptebla, ke ĉiuj tiuj reprezentantoj de la antaŭelektita raso estos perditaj por sia devenlando? Evidente ne. Sekve la grandaj patriotaj Berlinaj societoj eklaboris kaj, dank'al iliaj persistaj klopodoj, la Germanoj disirintaj sur la tuta tero rekontaktiĝis kun la patrolando kaj refariĝis konsciaj kaj disciplinoplenaj porlaborantoj de la germanismo.

La tasko de la organizantoj de la eksterlanda germanismo (Deutschtum im Ausland) ne estis facila. Ili tamen plenumis ĝin kun la obstina persistemo, kiun ili metas en ĉiuj siaj entreprenoj. Per la perado de la diplomaciaj oficistoj de la imperio, ili ricevis la listojn de ĉiuj Germanoj ensidantaj en ĉiu konsula distrikto. Poste ili sendis al tiuj elradikiĝintoj gazetojn, flugfoliojn kaj broŝurojn, en kiuj oni memorigis ilin pri ilia glora deveneco, en kiuj la pligranda Germanujo estis laŭdegata, en kiuj famaj profesoroj anoncis al ili, ke la patrolando, se ili restos fidelaj al ĝi, nepre partoprenigos ilin en ĉiujn siajn estontajn glorojn kaj profitojn.

Tiuj individuaj konsiletoj ne povis sufiĉi. Tial la pangermanistoj diligente fondis ĉie, kie eble, germanajn filantropiajn kaj sportajn societojn, germanajn lernejojn, eĉ germanajn teatrojn. Nur tiuj, kiuj estas konstante legintaj la « Eĥon » (das Echo), tiun ampleksan ĉiusemajnan revuon, presitan po tricentmil ekzempleroj kaj havantan abonintojn sole en fremdaj landoj, nur tiuj povas klare prezenti al si la timegindan organizaĵon, kies maŝoj implikis la tutan mondon. En ĉiu numero oni trovis multajn kaj plenplenajn raportojn pri la patriotaj kunvenoj de la germanaj societoj en ĉiuj landoj, longajn tutnombrantajn listojn da novaj germanaj lernejoj fonditaj sur ĉiuj kontinentoj. Per la « Eĥo » mi sciigis, ke en Bruselo ekzistis ne nur popolaj germanaj lernejoj, sed ankaŭ germana gimnazio, kies profesoroj estis rajtigitaj liveri la ateston pri matureco; ke en la Kaplanda kolonio oni instruis la germanan lingvon en multaj sendependaj institutoj; ke en Novjorko estis du germanaj



teatroj kaj kelkaj multekzemplere presitaj germanaj gazetoj; ke la Germanoj sentis sin sufiĉe fortaj en Usono por grupigi tie siajn tri milionojn da elektraĵtuloj en nacian aŭ pli ĝuste kontraŭnacian partion; kaj fine, kio estas la plej mirinda afero, ke en Parizo kaj en la departemento « Charente » la FLOTTENVEREIN, societo por la pligrandigo de la germana ŝiparo, havis du prosperajn sekciojn.

Se mi estos aldoninta, ke, sub la inspiro kaj direkto de la pangermanista societo, tiuj grupoj da elmigrintoj estis ĉie kutimiĝintaj brue soleni la feston de la imperiestro kaj la datrevenon de « Sedan » kaj ke la eĥo de la oratorajoj tiuokaze fremdlande diritaj de parolantoj, kiuj observis nenian moderecon, plenigis la gazetojn de Berlino, Hamburgo, Lejpsigo kaj Frankfurto, tiam vi eble klare prezentos al vi la grandegan laboron, kiun la pangermanistoj plenumis dum kompare mallonga tempo.

Nu estas ankoraŭ notinde, ke la elmigrintoj religitaj tiamaniere al la patrolando estis preskaŭ ĉiuj nacianiĝintaj en la gastigemaj landoj, kie ili starigis sian tendon. Tio ne malhelpis, ke ili metis inter siaj amataĵoj sian devenlandon multe super sia adoptlando. En la spiriton de ĉiuj oni estis enradikiginta la faman maksimumon: SEMEL GERMANUS, SEMPER GERMANUS (iam Germano, ĉiam Germano). Nenia leĝa formalajo kapablas forigi tiun neforigeblan econ. La germana nacio, kiu nacianiĝis Amerikano aŭ Franco, konservas malgraŭ ĉio sian unuan naciecon, sur kiu la nova nacieco inokuliĝis ne mortigante la originan trunkon. Li nur surŝmiris per ia lako la lignon, el kiu li estas farita. Se la ligno iajoje ŝvelas pro la internaciaj veterŝanĝiĝoj, tiam la lako fendiĝas, forpecetiĝas kaj defalas, aperigante la kverkon, kiu surhavis ĝin sed ne penetriĝis de ĝi. Okaze de tio, mi rimarkigos, ke la fama « Delbrück' a » leĝo enkondukis preskaŭ nenion novan. Antaŭ ol ĝi estis akceptita de la Germana Parlamento, jam la fremdlande nacianiĝintaj Germanoj povis, per simpla deklaro farita en germana konsulejo, konservi la germanan naciecon kaj ties utilojn certigi al sia idaro. La nova leĝordono nur forigis la paragrafon de la malnova leĝaro, laŭ kiu ĉiu Germano restadinta dum dek jaroj en fremdlando, ne returninte en la devenlandon aŭ ne enskribiginte sin sur la listojn de la konsulejo, perdis memsekve sian naciecon.

Jen kiamaniere Germanujo estis lerte reakirinta sian estrekan influon super la milionoj da regnantoj foririntaj de ĝi kaj kreinta en ĉiuj landoj potencajn kaj agantajn centrojn de germanismo. Ni tuj vidos, kiel ĝi sukcesis en entrepreno ankoraŭ pli malfacila, kiel ĝi faris el la simpla turisto volonteman misiiston por la germana patrujo.

Antaŭ la milito oni ĉie renkontis la germanajn turistojn. Surhavantaj la tradician verdan ĉapeleton ornamitan per peniko da ĉamharoj, portantaj la tirolan veston el griza lano kun verdaj borderaĵoj, kiun Deffreger eterne famigis, kun la nudaj genuoj, kun la tibikarnoj envolvitaj per dikaj broditaj ŝtrumpoj, kun vastaj ferumitaj ŝuoj, kun la pikbastono en unu mano kaj la Baedekerlibro en la alia, tiuj ridoperetaj roluloj trapaŝegis tuj de la reveno de printempo ĉiujn vojetojn en Svisujo kaj en la Italaj kaj Francaj Alpoj, same kiel la bordojn de la Rusaj lagoj, rabiste uzis ĉiujn duarangajn hotelojn, sengêne paradis ĉe la eksteraj tabloj de ĉiuj kafejoj, farante tian bruegon, ke la aliaj fremduloj, pli sindetenaj, tutcedis la lokon al ili, unuvorte kondukis kiel venkintoj en la militakirita lando, estante antaŭe certaj, ke ili trovos ĉe la hotelistoj kaj la suba geservistaro de la kosmopolitaj karavangastejoj la plej malnoblajn komplezojn tial, ke, dank' al la akaparo de siaj samnacioj je la tuta hotelmastrado, ili estis ĉie familianoj. La superaĵa observanto kontentigis ŝercante ilin kaj, se unu el tiuj ridindaj subaktoroj de la granda internacia dramo sin riskis kun sia fantazia kostumo sur la parizaj bulvaroj, la pariza bubo pensis, ke li sufiĉe venĝas la nacian bonguston ekpafante el sia popolkvartala sagujo delikatan moksagon. La dikulo ŝajnis nenion aŭdi. Per sia peza paŝo li plue promenadis

tra la stratoj de la franca ĉefurbo, observante, esplorante, ĉiufanken traserĉante kolektante la utilajn informojn. Se li estis profesoro, li prefere haltis antaŭ la libristaj montraĵoj fenestroj; se li estis industriisto, li provis provizi la memoron per novaj modeloj kaj ofte li estis tiel senhonta, ke li tiris el la poŝo notlibreton sur kiun li desegnis rapidan skizon; se li estis oficiro, li plivole trairis la parizan ĉirkaŭaĵon kun staba landkarto en la mano por noti sur ĝin la plej alireblajn alirejojn.

Cetere la germana turisto ne ĉiam havis la ridindan eksteraĵon, kiu liveris tiel multajn kaj tiel ridegigajn karikaturojn al Hansi kaj al Zislin. Li kapablis surmeti ĉiujn trompovestojn kaj li estis precipe danĝera se li diferencigis el la amaso nur per la mal-lerteco de siaj pretenderigidaj teniĝoj, per la pedantaj dirformuloj, el kiuj la Germano ne sukcesas liberiĝi, per siaj bruaj voĉeksplodoj kaj la maldolĉaj sonoj de sia akcento.

Nur se oni ĉeestis la forveturon de la germanaj turistoj ĉirkaŭ la Pasko kaj dum a dua parto de julio, oni povas plene prezenti al si la gravecon de tiu amasmigrado. Ĉiuj niaj vagonaroj en Alzaco-Loreno, kvankam nombre duobligitaj, estis tiel plenplenaj, ke oni ne povus loki plie en ilin eĉ vindinfanon. Altaj oficistoj, ĉiurangaj oficiroj, komizoj, manlaboristoj el ĉiuj regnoj de la konfederacio puŝamasigis en ili meze de la plej neverŝajna konfuzaĵo da manpakaĵoj. Eĉ la koridoroj estis obstrukcitaj kaj tiu brua amaso, konscia pri la plenumota misio, intersanĝis la plej miregindajn interparolojn: « Vi veturas Lucernon? En kiu hotelo vi loĝos? — En la hotelo « Blanka Negro ». — Neeble. Ĉu vi nescias, ke la posedanto devenas el franca Svisujo kaj ke la tuta servistaro estas enlandana? — Dankon por la sciigo; mi serĉos pli germanan gastejon. — Mi veturas Lausanne'on. Antaŭ ol forveturi, mi esploris la pangermanistan gvidlibron. La « Hotelo de la Romandaj Patriotoj » apartenas tute al ni. De la administranto ĝis la telerlavisto mi tie trovos nur samnacionojn, kiuj liveros al mi plej valorajn sciigojn pri la firmoj, kiuj vendas germanajn komercaĵojn. — Ĉu vi parolas france? — Iom. Sed mi zorge evitos montri sen nepra neceseco, ke mi konas tiun lingvon. Oni prave postulas de ni kiel devon, kiam ni vojaĝas eksterlande, ke ni ĉie parolu la germanan lingvon, por ke niaj gastigantoj estu devigataj lerni ĝin. Plie, la francaj Svisoj, se ili supozas, ke ni nescias ilian lingvon, trudas al si nenian ĝenecon kaj ni povas facile kolekti multvalorajn informojn observante iliajn interparoladojn. — Kiu estas la praktika celo de via vojaĝo? — Mi serĉas novajn aĉetantojn por mia industrio. Ŝajnas al mi, ke miaj vojaĝistoj estas iomete senfervoraj kaj mi volas kontroli ilian aktivecon. — Mi iras por fari kelkajn geologiajn esplorojn. Oni konigis al mi kelkajn fervejojn, kiuj povus esti facile akaparitaj de unu el niaj grandaj metalurgiaj societoj antaŭ ol la enlandanoj suspektos ties valoron. »

Tiel ĉiu el tiuj ekskursantoj estis antaŭasigninta precizan celon al sia vojaĝo. Li deziris amuziĝi, mi konsentas, sed estis necese, ke liaj amuziĝoj multprofitigu al li kaj precipe ke ili helpu por pliigi la riĉecon kaj gloron de la pligranda Germanujo. Pro kio? Tial, ke la imperia registaro kaj la grandaj patriotaj societoj lerte altrudis tiun disciplinon al lia pasiveco.

Nek la Anglo, metodema sed kontraŭa al ĉiu ajn regularo, nek la Franco, sprita kaj elpensema sed individualista ĝis la ekstrema limo, nek la Italo fantaziema, nek la Hispano malklopodema povos iam kompreni, ke tuta nacio kapablis vole submeti al soldateca disciplinigo sian industrian kaj komercan agadon kaj ke, en tiu grandega kuniĝo da personoj de diversaj temperamentoj kaj de ofte kontraŭaj utiloj, ĉiu individuo, sciante, ke li tiros proprajn profitojn el la ĝenerala prospereco, formetis sian personan volon por submetiĝi blinde al la instrukcio de la estroj. Sekve la latina turisto celas nur amuziĝon. Precipe li deziras forgesi la sklavaĵojn de la ĉiutaga vivo. Kun kiel malŝata rideto li regalus tiun, kiu subite dirus al li: « Transpasinte la landlimon, vi precipe estas plenumonta patriotan mision. » Male la Germano akceptas

la instrukcion. En la lernejo li jam subiĝis al unua ekzercado. Kiam, kondukata de la instruisto, la lernanto ĉe la transrejnaj unuagradaj lernejoj aŭ gimnazioj foriras ekskurse, tiam oni vizitigas al li prefere la monumentojn konstruitajn por la gloro de la venkintaj generaloj, la batalempojn, kie la germana sango fluegis, kaj oni donas al li tie, en tia multpensiga ĉirkaŭaĵo instruon pri nacia solidareco, kia postlasos en la infana animo neforigeblajn memoraĵojn. Tuta la instruado, kiun li ricevis, estas cetere signita de sama stampo de plej entuziasma patriotismo.

Elirinte el la lernejo, la juna Germano estis diligente akceptata de kelkaj el tiuj multegaj societoj por sporto, militista preparado, vundhelpado, kiuj, direktate de unuagradaj instruistoj aŭ de rekrutinstruantaj soldatoj, aranĝas laŭ la sama metodo la dimanĉajn ekskursojn. En la kazerno, la promenadoj de la rekrutoj estis ankaŭ gvidataj de suboficiroj, kies patriotismaj logparoladoj pliflamigis la memestimegon de la junuloj fieraj pro tio, ke ili apartenas al la nevenkebla armeo, al la elektita raso, al la antaŭdestinita popolo. Eĉ ĉe la plej konvinkoplenaj liberemuloj, tiu sistema preparado restigis postsignojn. Tamen mi ne devas forgesi, ke ne estas eble paroli pri liberemuloj kun la senco, kiun ni ordinare kunigas kun tiu vorto, en nacio, kiu tute estas kvazaŭsoldate obeemigita. Ĉu ankaŭ la germana socialismo (la okazintaĵoj tion pruvis) ne konsistigas armeon, en kiu la firme starigita hierarkio toleras neniun ribelon kaj malpermesas ĉian pensan kaj agan liberecon tuj se la ĝenerala utilo, kian komprenas ĉiupova direktanta komitato, trudpostulas la pasivan obeon de la partianoj?

Nu, tiun lakeemon antaŭkalkulis la patriotismaj societoj por fari el la turisto, eĉ unuopa, ageman poraganton de la pligranda Germanujo en eksterlando. Same kiel la industriisto, kiel la komercisto, kiel la laboristo, tiel la vojaĝanta Germano estas preta submeti sian juĝokapablon kaj sian agadon sub la ordonajn konsilojn de la konsciencogvidantoj, kiujn li ne povas plu forhavi. Jen kion diras al li tiuj gvidantoj per la gazetoj, broŝuroj kaj flugfolioj, kiujn ili senlace redaktas kaj dissendas en la tutan landon. (La interparoladoj, pri kiuj mi ĵus atentigis vin, estas nur eĥo de tiu aparta literaturo): « Memoru ĉie kaj ĉiam, ke ci apartenas al la superega popolo. Eĉ se ci konas la lingvon de la lando, kie ci vojaĝas, parolu nur germane. Loĝu, se eble, nur en hoteloj mastrumataj de Germanoj, kaj inter tiuj ĉi elektu ankaŭ tiujn, kiuj estas mastrumataj de tiaj samnacionoj, pri kiuj ci scias, ĉu ili konservis la tutan alligitecon al la ĉefpatrujo. Nepre postulu, ke en tiuj ejoj oni prezentu al ci germanajn produktojn kaj ke la manĝokarto estu redaktita en cia patra lingvo. Trinku nur bieron enportitan el Germanujo. En la magazenoj aĉetu nur komercaĵojn portantajn la markon: *Farita en Germanujo*. Laŭde parolu ĉie pri la germana industrio, pri la germanaj metodoj, pri la germana scienco. Por ke ci ne eraru, ni donos al ci gvidlibrojn, en kiuj ci trovos ĉiujn bezonajn adresojn. Niaj bonaj konsiloj akompanos cin ĉiulokon. Tiel amuzigante kaj instruigante ci faros gravajn servojn al cia patrolando kaj ci estos la pioniro de la Germanismo en la landoj, kiujn ni volas iom post iom subiĝi. Poste, ne forgesu, ke dum ciaj vojaĝoj ci povas fari multegajn utilajn observojn. Notu kion ci vidas kaj transsendu al ni la sciigojn, kiujn ci estos kolektinta. Eĉ la ŝajne plej malgrava detaleta povas utili al niaj industriaj, komercaj kaj patriotaj societoj. Fine plifortigu ĉe niaj fremdlande sidantaj samnacionoj la patriotisman senton. Diru al ili, ke la devenpatrujo ne forgesas ilin kaj ke ili devas por sia utilo konservi intimajn rilatojn kun ĝi. Se ci tiamaniere agos (kaj certe ci ne povos tion ne fari, ĉar ni observos cin akurate), ci multe kunhelpos por la gloro de Germanujo, kiu morgaŭ superregos la mondon. »

Ne kredu, Gesinjoroj, ke mi troigas. Dum la lastaj jaroj la pangermanista societo kaj la societo « Eksterlanda Germanismo » (*Deutschtum im Ausland*) senĉese parolis tiamaniere al la germanaj turistoj. Ili publikigis tre multpensigajn gvidlibrojn, en

kiuj oni trovis ekzemple la jenajn sciigojn : « En tiu itala urbo ne loĝigu en la hotelon « je la Suno », kiu estas mastrumata de iu kontraŭaŭstrulo. Elektu prefere la hotelon « je la Blanka Ĉevalo », kies mastrumanto estas Germano kaj restis tre patriota. La mastro de la hotelo « je la Kruco » estas ankaŭ germandevena, sed iliaj infanoj parolas nur itale. Evitu la domon de tiu malfidelulo kaj prefere manĝu en itala restoracio mastrumata de enlandano. »

Mi preskaŭ hontas diri tion, ĉar mi timas, ke oni rigardos min kiel malbonan ŝerculon, sed en unu el tiuj gvidlibroj mi legis per miaj propraj okuloj la jenan frazon : « Evitu la hotelon je la Verda Arbo ĉar oni disponigas al la klientoj nur italajn alumetojn ».

Estas facile kompreni la grandajn utilojn, kiujn Germanujo ja tiris el tiu propagando. La hotelmastradon preskaŭ ĉie kaj preskaŭ tute posedi estis sukcesintaj ĝiaj nacioj. Efektive, kiu Franca aŭ Angla vojaĝanto, antaŭ ol li loĝigos en iun hotelon, zorgas pri la rasa deveno de la servantaro? Male la Germano, principe parolante nur sian patrollingvon, devigis la hotelmastron, se okaze tiu ĉi ne estis lia samnaciono, dungi germandevenajn kelnerojn. Li volis senti sin hejme en ĉiu loko ne pro la propra oportuneco, sed pro tio, ke, konsciante sian patriotan mision, li esperis kunhelpi, eĉ nur tre malgrandparte, por la iompostioma invado en la fremdajn landojn kaj por la tutkaptado je iliaj riĉaĵoj de siaj samrasanoj.

Oni bezonas esti vidinta kaj observinta tre precize ĉiujn tiujn lerte preparitajn manovrojn por prezenti klare al si la timegindan organizon de tiu militiro de la germanismo por paca venkakiro. Mi citu ekzemplon inter miloj aliaj. Antaŭ ĉirkaŭe dek jaroj, fondiĝis en Berlino sub patronado de la Centra komerca kaj industria Komitato, iu societo por protekto de la germanaj produktaĵoj. Tiu societo havis proprajn vojaĝistojn, kiuj procedis jene : ili veturis en la germanajn provincajn urbojn kaj en la fremdajn urbojn vizitadotajn de la germanaj turistoj, atente observis la magazenaĵojn, montrofenestrojn, eĉ faris, se necese, kelkajn aĉetetojn. Poste, kolektinte la dokumentarojn, ili revenis en la sidejon de la societo. Nu, post malmultaj tagoj, la komercistoj en la vizititaj lokoj ricevis mirante leterojn kun solena presita titolo, kie ili legis la jenajn frazojn : « Ni sciiĝis, ke vi vendas anglajn produktaĵojn. Nu vi ne povas nescii, ke la germana firma X. Y. fabrikas la saman komercaĵon en kondiĉoj tute egale profitigaj. Favorante la fremdajn produktojn, vi malutilas la nacian industrion. En la okazo se, kvankam vi estas taŭge avertita, vi ne forlasus tiujn hontindajn procedaĉojn, ni bedaŭrante estus devigataj atentigi vian klientaron pri via perfido kaj admoni ĝin, ke ĝi aliloken portu sian bonan germanan monon. »

Jen kion tiuj denaskaj spionoj faris ĉe si kaj ĉe siaj najbaroj, jen kiel iliaj turistoj, dank'al la lerta organizo de la militanta pangermanismo kaj ankaŭ dank'al la blinda tolero de iliaj gastigantoj, estis grandparte kunhelpadantaj al la germana superestriĝo.

Ĉu vi promenis dum la lastaj jaroj ĉe la ravaj bordoj de la norditalaj lagoj? Se jes, kian preman impreson vi sentis, konstatante, ke tie ĉio estas germana, hoteloj, lukampodomoj, magazenaĵoj reklamiloj! Kaj ĉu mi citu ankaŭ iun urbon en la Franca Savojo, kie oni trovis preskaŭ nur germanlingvajjn anonetabulojn pro la trudpostulado de la germanaj turistoj? Ha! Priŝercu tiom, kiom vi volas, la ridindegulon, kiun Hansi skizis en siaj amuzaj karikaturoj. Tiu komiketa turisto estis ia viziisto, ia apostolo. Ĉie, kie li pasis, li plenmane disjetis la germanan semon, kiu estis baldaŭ elgermonta per malmankaj rikoltoj por la germanlandaj eksportistoj. Oni primokis lin, sed, nezorgante la akompanantajn ridojn, li antaŭenmarŝis al la venkakiro de la mondo. Li sciis, ke lia malgranda faro ne povas efiki gravajn rezultatojn, sed li ne nesciis ankaŭ, ke, instigate de liaj estroj, miloj da aliaj Germanoj faras samhore la saman faron kaj ke el la akordo de tiuj ŝajne sensignifaj klopodoj eliĝos la gloriĝo

de la patrujo, kiu partoprenigos lin poste en sian senkomparan potencon kaj en sian nekredoblan riĉecon.

Vi espereble pardonos min, Gesinjoroj, se mi eligos el tiu ĉi mallonga resumo kelkajn praktikajn konkludojn : Ĉu la germana organizo estas idealo, kies efektivigon ni mem devas profite celi? Ne, ĉar ni devus pagi por ĝi tro grandan prezon, la forferon je la individuaj kvalitoj de la plej sendependema, sed ankaŭ plej elpensema kaj nature plej nobla raso. Mi tute ne povas supozi, ke la Franco, lasante trudi al si kvazaŭregimentan disciplinon jam de sia unua eniro en la lernejon ĝis sia morto kaj forĵetante la fantazion, el kiu konsistas la ĉarmeco de lia spirito, fariĝus simpla aŭtomato.

Sed inter la prusa disciplino kaj la plena manko de samcelemo estas larĝa kampo. Ĉu ni ne povas doni en niaj lernejoj pli vastan lokon al patriota instruado, kiu pliigos la pravan fierecon ĉe popolo, kies gloraj devenoj estas tiel antikvaj, kies historio estas tiel riĉa je heroeco kaj bonanimeco, kies noblaj iniciatoj partoprenigis la tutan mondon en la bonajojn de la libereco? Ĉu nia komerco kaj nia industrio ne povas prunti el Germanujo ĝiajn severajn metodojn, kiuj certigis al la lastevenintoj en la batalo por la vivo estrecon, kiun pravigas nek la tradicio nek la kvalito de la produktoj nek la honesteco en la komercaj aferoj? Ĉu estas nepra motivo, por ke niaj bankoj obstine disŝutu la francan oron en fremdlandajn entreprenojn, anstataŭ disponigi ĝin al saĝaj kaj entreprenemaj samnacionoj? Ĉu la francaj konsuloj nepre devas ankoraŭ en la estonteco plenumi nur siajn senutilajn ceremoniajn funkciojn, dum ili devus esti agemaj komercaj agentoj, kiaj estis la germanaj konsuloj? Ĉu la fremdlande loĝantaj Francoj ne povas kunigi en densajn grupojn, al kiuj la oficialaj reprezentantoj de la Respubliko certigos sian efektivan protektadon? Ĉu la Franco alilanden vojaĝanta ne povas peni por disvastigi la uzadon de sia lingvo, por trovi klientojn al siaj samnaciaj produktantoj? Kion la sensprita kaj sentakta Germano povis efektivigi tial, ke supera ŝtata potenco devigis, ke li akceptu rigidan direktadon, tion la Franco, denaske sagaca, plenumos ankoraŭ pli facile. Tiucele sufiĉus, ke oni pluigos ĉe li post la milito la solidaremon, kiun naskis la danĝero kaj kiu kapablis post nur malmultaj monatoj krei tiomajn mirindaĵojn.

Efektive, Germanujo bezonis ja preskaŭ jarcenton kaj eĉ pli por krei el la kompatinde senvalora homa materialo, kiun ĝi disponis, la militistan organizon, pri kiu ĝi tiom fieras. Tamen la degeneruloj, pri kiuj ĝi mokis, reatingis la eksterordinare antaŭiĝintan antaŭiranton nur en la daŭro de malpli ol unu jaro. Nunhore, ĉar ĉiu Franco komprenis la necesecon de vole akceptita disciplino, tial niaj armeoj estas tiel taŭge provizitaj je la bezonaj iloj, tiel bone kaj eĉ pli bone komandataj ol tiuj de la germana imperiestro. La Franco do povas, se li volos, venki la Germanon sur ĉiuj kampoj.

Ni prunteprenu de la malamikoj liajn seriozajn kvalitojn, ne imitante liajn mankojn. Jam de nun la venko apartenas al la praveco kaj al la justeco. Sed tiu venko, por ke ĝi estu daŭra kaj netrompa, devos enhavi ĝerme la definitivajn morgaŭajn triumfojn. Ne sufiĉas renversi la prusan glavoregadon. Se post kelkaj jaroj la alta bankieraro, komercistaro, hotelmastraro estas en Francujo refoje tutokupitaj de la Germanoj, se tiuj ĉi rekomencas sian aktivan agadon en niaj havenoj, se denove iliaj komercaĵoj superŝutas la tutmondan komercon, se iliaj elmigrantoj ĉie restarigas potencajn societojn kaj tiel en ĉiu fremda lando kreas ŝtaton en la ŝtato, tiam la nobla sango de duonmiliono da junaj Francoj estos vane elverŝita.

Estas nia ŝuldo al niaj gloraj mortintoj, ke ni plibone komprenu kaj plibone praktiku la nacian solidarecon. Ili volis Francujon venkinta, sed ili volis ĝin ankaŭ granda, respektata, riĉa, feliĉa, rekomencanta en la mondo sian civilizan mision. Tia estos Francujo kaj eĉ pli tuj, kiam pli severa organizo estos servanta al ĝia el-

pansema kaj popularigema spirito. La reĝeco de la germana pedantaĉo kun la oraj okulvitroj finiĝis, denove la parolvico apartenas al la Keltogallo sprita, facilparola kaj noblanima. Tro longtempe la homaro, mirrigidigita de la bruta forto, sidis sur la benkoj de la germana lernejo, kie oni emfaze eldiris al ĝi en konfuzega lingvo la eltrovojn faritajn alilande. De nun niaj scienculoj, niaj literaturistoj, niaj inĝenieroj, niaj komercistoj, niaj laboristoj reprenos la lokon, kiu rajte apartenas al ili. Kaj la franca demokrataro, pli saĝa, pli disciplinema, pli konkordema tial, ke ĝi estas instruita de la okazintaĵoj, denove reakiros la direktadon de la moviĝo, kiu kunportas la homaron al la progreso. *Non Germania, sed Gallia docet.* (Ne Germanujo, sed Francujo instruas.)

(Tradukis E. G.-M.)



ÖNB



+Z97870000